


IsraEla Esperantisto



ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (ELI)

Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004

N-ro 55. Septembro 1975

Natan Jalin-Mor

DANK' AL ESPERANTO

Komence de Oktobro 1939 mi alvenis al Lvovo post monato de migrado kaj vagado tra Polio, forkurante de la germana armeo. En Volino (orienta Polio) mi eksciis pri dividado de Polio en sovetan kaj germanan okupan zonan. Mi decidis atendi ĝis organiziĝos iomete la nova reĝimo kaj poste veturi suden. Nia intenco estis klara. Ni velis Israellandon. Ankaŭ miaj amikoj de la cionista revizionista junularorganizaĵo "Betar" estis tie kaj decidis veturi suden. Ni devis serĉi eblecon trapasi la ŝtatlimon al Rumanio, ĉar de tie la vojo estis malfermita.

Ni veturis per vagonaro al urbeto Sniatino-limurbeto inter Polio kaj Rumanio. Akompanis min Ŝraga Hajtin. Li posedis anglan-palestinan pasporton. Ni esperis, ke ni trovos eskapvojon kaj ni informos niajn kamaradojn pri ĝi en Lvovo. Ŝraga estis bonega akompananto. Ni estis gajaj, ĉar finfine ni veturis al nia celo. Ni estis plenaj de optimismo, kiam ni tra la fenestro de vagono vidis nomon de stacio - Sniatino.

Kiam la pordoj de la vagono malfermiĝis, staris apude sovetaĵoj soldatoj. La Sniatinanoj ricevis permeson iri hejmen. La fremduloj, kiel ni, estis kondukitaĵoj al policejo. Ni estis fermitaj en granda ĉambro. Oni notis niajn nomojn kaj poste ni estis vokitaĵoj unuope por esploro. Sraĝa prezentis sian pasporton kaj klarigis, ke li volas reveni hejmen al Palestino. Li ricevis respondon, ke la ŝtatlimo estas fermita kaj li devas atendi ĝis alvenos ordonoj por eksterlandanoj, kiuj estis en Polio dum la milito. Li estis resendita al Lvovo.

Laŭvice mi estis alvokita por esploro. Soveta policano notis miajn respondojn. Ili ne konvinkis lin kaj mi estis sendita en la arestĉambron reen. La duan tagon mi estis ree esplorata. La loĝantoj en la arestĉambro rapide ŝanĝiĝis. Multaj de ili malaperis. Mi ne sciis, kio okazis kun ili. Anstataŭe plenigis la ĉambron novaj "gastoj" de posteaj trajnoj. Nokte turmentis min pensoj, ĉu ili ne eksciis mian politikan biografion. Eble ili forsendos min malproksimen kaj mi ne plu vidos mian edzinon, kamaradojn kaj landon, al kiu mi sopiris.

La trian tagon matene mi estis vokita denove. Oni enkondukis min en la ĉambron, kie sidis juna, civile vestita homo. En la komenco mi ne vidis lian vizaĝon kaj mienon. Mian atenton altiris emblemo, kiun li portis sur sia vesto. Verda stelo sur blanka fono.

Antaŭ ol li komencis siajn demandojn, mi turnis min al li kaj demandis mallaŭte kaj hezite: "Samideano?" Li estis sendube surprizita, sed respondis esperante: "Jes". De nun ni komencis esperantan interparoladon.

Mi lernis esperanton dum la lastaj dudekaj jaroj. Mi estis fascinata de ĝia simpla kaj logika strukturo. Logis min ankaŭ la ideo de unu lingvo, per kiu la homaro povus nuligi la pekon de babela turo. Kiel bone estus, se la homo lernus nur du lingvojn, sian nacian kaj internacian, en kiu estus tradukitaĵoj ĉiuj kulturaj trezoroj de la mondo. Speciale devas esti interesitaĵoj pri tio la malgrandaj popoloj. Mi parolis tiam flue esperante.

La esploristo aŭskultis atente kaj kontente mian rakonton pri la lingvo kaj kiel mi ĝin ellernis kaj ke mi estis Delegito de UEA en mia naskiĝurbo Grodno. Ankaŭ la esploristo rakontis al mi pri si. Li naskiĝis en Sniatino, aliĝis kiel junulo al la komunista partio. Kelkfoje li estis juĝita en la polaj juĝejoj pro la komunismo kaj sidis 10 jarojn en malliberejoj. Dum la milito li liberiĝis kaj la socia ordo, por kiu li batalis alvenis... Nun li estas esploristo. Ankaŭ li ne kredis mian rakonton, kial mi venis al Sniatino. Malgraŭ tio mi sentis simpatian de lia flanko.

Je la fino de longa interparolado li deklaris: "Ne ĉion, kion vi rakontis, mi kredas. Vi konvinkis min, ke vi estis studento en Varsovio, sed aliaj rakontoj estas dubindaj. Mi tamen ne volas daŭrigi la esploron kaj teni vin en malliberejo. La fakto, ke vi konas esperanton estas grava. Se mi daŭrigus la esploron, mi malkaŝus diversajn pekojn. Pro tio mi liberigas vin. La policanoj kondukos vin al la trajno, por ke vi veturu al Lvovo. Mi volas konsili al vi: estu singardema, por ke vi ne estu kaptita de nove. Se vi ankoraŭfoje revenos ĉi tien, mi ne povos vin liberigi kaj vi sendube estos sendita malproksimen."

Mi dankis lin kaj diris, ke mi ne revenos Sniatinon. (Eble nur se mi sopiros al esperanta interparolo).

Kiam la policanoj forlasis min sola en la vagono, mi eksentis, ke mi restis libera dank' al esperanto.

David Simoni

H e j m o n

Al hejm' mi nostalgias, -
Al patra dom-ruino;
Ĉar kadukiĝis patro,
Maljunas la patrino,
Disigis nin dum jaroj
Severa viv-destino.

Mi venos antaŭ Pasko
Al la vilaĝkvieto,
Dum sun' respeguliĝas
En pluva kot-laĝeto,
Dum la printemp' ree ŝas
Al birda ĥor-dueto.

La Judoj sin preparas
Al fest' en ĉiu loko;
Sur la baril' de l' korto
Salute krias koko,
En la aero sonas
Printempa gaj-alvoko.

Popaŝe ĉevaleto
Sin trenas trans la kotoj,
Kaj ŝprucas la ĝlimakvo
Sub radoj kaj sub botoj;
Rebrilas sun' survande
En plumbaj, kupraj potoj.

Fenestroj malfermiĝas
Per manoj junulinaj.
Jen oraj haroligoj
Rigardoj- kolombinaj.
La vitrojn ili viŝas
Kun kantoj am-fascinaj.

Jen estas patra korto
Garden' - jen en angulo,
En ĝi ankoraŭ kuŝas
De blanka neg', makulo,
Kverk'nuda klinas kapon:
Salut' al venintulo.

Klinfale staras muroj
 Kurbiĝis la perono,
 Jam malnoviĝis domo,
 Nigriĝis la plafono;
 El ĉambroj voĉ` aŭdiĝis-
 Patrino, milda sono.

Odoras freŝmetita
 Surplanken pajla fasko,
 Jam regas en dometo
 Solen-etos` de Pasko;
 Purec` kaj ord` en ĉambroj-
 Patrino estas tasko.

Briletas larmogutoj
 Sur ŝia vango mola,
 Rigard` de patrino estas
 Kompata kaj konsola;
 Etendas nudajn branĉojn
 Tra pord` kverk` senparola.

"Laciĝis vi, ho, filo,
 De vag` en fremda lando!..."
 Sur tablo jam atendas
 Kun te` bakaja frando.
 La sun` en flam` subiras
 En okcidenta rando..."

Tradukis:
 J. Kohen-Cedek

J. Semer

Jerusalemo - Ĉefurbo de Israelo

En la historio de Jerusalemo ni povas observi senĉes-
 sen ĉenon de detruo kaj reconstruo, konkero kaj sendepen-
 deco, tristo kaj ĝojo.

La ekfloro kaj falo de la Sankta Urbo respegulas la
 sorton de nia lando kaj la historion de la juda popolo
 ek de ĝia komenco.

Dum la generacioj Jerusalemo (Ciono) estis objekto
 por sopiroj kaj espero en la koro de la popolo kaj sa-
 kiel tiam, ankaŭ nuntempe, ĝi estas la ĉefurbo de Israelo.

Jerusalemo estas unu el la plej antikvaj loĝlokoj en
 Israellando. Hebreoj konkeris ĝin ĉ. la jaro 1000 a.K.
 La konkero la Reĝo de Judio, Davido faris de Jerusale-
 mo sian ĉefurbon. Lia filo Salomono konstruis tie la Tem-
 plon kaj fondis en la urbo religian centron por la triboj
 de Israelo.

En la sesa jarcento a.K. Babelanoj konkeris la urbon.
 Ili detruis la urbon kaj bruligis la Templon. La plimulto
 de Judoj estis ekzilitaj al Babelo. Pri la sopi-
 ro de tiuj ekzilitoj Jerusalemo povas atesti la dolorple-
 na sopirkanto el la Psalmaro (ĉapitro 137): "Apud la rive-
 roj de Babel ni sidis kaj Ploris, Rememorante Cionon. Se
 mi forgesos vin, ho Jerusalemon, Tiam forgesigu mia deks-
 tra mano. Algluigu mia lango al mia palato, Se mi vin ne
 memoros, Se mi ne levos Jerusalemon en la supron de miaj
 ĝojoj."

La persa reĝo Ciro, kiu konkeris Babelon, permesis
 al Judoj reveni al Jerusalemo kaj reconstrui la Templon.
 La lokon de la persaj regantoj kaptis poste Helenoj (Gre-
 koj). Ili komencis agi kontraŭ la juda kulto kaj profanis
 la Templon en Jerusalemo. Ĝi kaŭzis fortan judan ribelon,
 kiu finiĝis per la liberigo de la urbo kaj de la resankt-
 iĝo de la Templo. La sendependeco de Judio daŭris tiam
 pli ol cent jarojn, ĝis kiam Romianoj konkeris Jerusalemon.
 Ĝi okazis dum la vivo de Kristo, kiu vivis ankaŭ en Jeru-
 salemo. De tiam restis tiu ĉi urbo sankta ankaŭ por la
 Kristanoj.

En la jaro 66-a p.K. eksplodis la granda ribelo de
 la Judoj. La milito inter la judaj ribelintoj kaj la ro-
 miaj armeoj daŭris 5 jarojn kaj kaŭzis duan detruon de la
 urbo kaj ĝia Templo. Jerusalemo tamen restis daŭre la
 centro de la juda popolo. La sola restaĵo de la forbrul-
 igita Templo - la Muro de la Ploro - restis de tiam ĝis
 nun sankta loko al Judoj, kiuj alvenadis tien el ĉiuj
 mondanguloj por preĝi al reconstruo de la Templo, de la
 Urbo kaj al sendependeco de la juda popolo en Israellan-
 do.

Dum preskaŭ 2000 jaroj pasis Jerusalemo de mano al
 mano. Konkeris ĝin Romianoj, Bizancanoj, Araboj, krucmili-
 tistoj, Mamlukoj kaj Turkoj. Dum kelkaj jarcentoj ne estis
 permesate al Judoj loĝi en Jerusalemo. Dum aliaj jarcent-
 oj troviĝis tie ĉiam juda komunumo. En la 19-a jarcento
 komencis la juda loĝantaro kreski. Ĝi, konstruante novajn
 kvartalojn grandigis la urbon.

Post la konkero de la lando fare de la brita ar-
 meo en la jaro 1917 fariĝis Jerusalemo administra centro
 de la lando.

Post la fondiĝo de la ŝtato Israelo (1948) ĝi re-
 fariĝis ĉefurbo de Israelo. La antikva parto de Jerusale-
 mo restis en jordania teritorio, ĉar la ŝtatlimo partigis
 la Urbon.

En la jaro 1967 estis reunigita denove la ĉefurbo
 de Israelo. Plenumiĝis la vortoj de la reĝo Davido en
 "la Psalmaro" (ĉ.122): "Niaj piedoj staris en viaj pordegoj,
 Ho Jerusalemon... konstruita kiel urbo, En kiu ĉio kuniĝis."

Publika letero

al la CK de Bulgara Esperanto Asocio (BEA)

Karaj bulgaraj "samideanoj"!

Dankon pro Via sincera letero, en kiu vi akuzas nin-esperantistoj-pro imperiismo kaj rasismo.

Ni tamen ne certas, ke vi en via popoldemokrata lando scipovas ricevi informojn, kiuj ne devenas de TASS. Do ni havas kelkajn demandojn al vi. Bonvolu respondi private, aŭ en via bulteno, sed ne per sloganoj, kiujn jam kelkfoje ni aŭdis dum MEM kunsidoj, sed ripetante la demandojn aldonu vian propran respondon... Tiam ni scios, ke viaj admonoj estas privataj, ne diktitaj per partio.

Ĉu vi scias, ke USONO ne nur ne instigis Israelon militi kontraŭ Araboj, sed jam kvaran fojon devigas nin liberigi okupatan teritorion; ke Sovetunio en la jaro 1967 instigis Arabojn ataki Israelon per mensoga informo pri israela mobilizo. Tiun sciigon vi jam povas trovi en ĉiuj arabaj ĵurnaloj; ke en la jaro 1973 Araboj mem sciigis, ke ili post tre bona preparo por milito, ruze atakis Israelon en ĝia plej granda festotago kaj Judoj eĉ ne atendis tiun atakon; ke post la venko en tiu milito, kiam nia armeo staris 35 km de Damasko kaj 100 km de Kairo. USONO-ne Sovetunio devigis nin forigi nian armeon; ke nun, kiam komenciĝis interparoloj pri armistico, la ĉefaj malhelpantoj estas Palestina Liberiga Organizaĵo PLO, sub subteno de Sovetunio; ke PLO en sia programo postulas neniigi Israelon kaj forigi Israelanojn, kiuj venis post la jaro 1917 (t.s. 90%). kien?

PLO postulas demokratan palestinan ŝtaton. Ĝis nun ĉiuj arabaj ŝtatoj krom Libano havas diktatoran reĝimon. En Libano PLO kaŭzis internan militon, kiu detruas tiun ŝtaton jam multajn monatojn. Antaŭ kelkaj jaroj simila milito okazis en Jordanio; ke eĉ la egipta radio kaj ĵurnaloj tute sincere skribas, ke la ĉefoj de PLO vivas kiel parazitoj en palacoj je la kosto de amaso de palestinaj viktimoj, kiuj suferas jam 27 jarojn, kaj tiu areto de politikistoj marĉandas kaj spekulacias je la palestina problemo; ke libana ĵurnalisto skribis en libana gazeto, ke li preferus israelan okupadon ol sovetan "protektadon;" ke la nombro de fuĝintaj Judoj de Arabaj ŝtatoj egalas la nombron de rifuĝintoj de Israelo, kaj Judoj jam sukcesis,

organizi sian novan vivon kaj palestinanoj vivas en tendoj en la landoj, kies supraĵo estas 200 oble pli grande ol la israela kaj kies riĉeco estas fabela;

ke Judoj, kiuj pri diversaj kaŭzoj restis en arabaj landoj vivas sen homaj rajtoj en gettoj similaj al gettoj de la dua mondmilito (sed sen permeso forlasi tiujn landojn); ke la vivnivelo kaj libereco de Araboj en Isralo estas pli altaj ol en ĉiuj najbaraj landoj;

ke Breĵnev nomis la plej ekstreman kontraŭisraelan ĉefon Kadafi "frenezulo" kaj nun liveras Sovetunio al tiu frenezulo la plej modernajn armilojn kaj instruas lin eluzi atomenergion;

ke Sovetunio liveris al Araboj armilojn por 24 miliardoj da dolaroj (ne rubloj aŭ levoj). Mi ne scias, kiom da mono de Bulgario troviĝas en tiu sumo;

ke la kvanto de armiloj (tankoj, aviadiloj, kanonoj) kiujn havas niaj najbaraj ŝtatoj estas trioble pli granda ol nia, la nombro de soldatoj 10 oble pli granda kun senlimaj rezervoj kaj la kvanto de raketoj centoble pli granda;

ke mirinda estas akuzo pri imperiismo, se vi pripensus tiun proporcion;

ke pli mirinda estas akuzo pri rasismo, ĉar Araboj estas same semidoj;

kaj plej mirinda estas simileco de tiuj akuzoj, kiujn ni legis en via letero al akuzoj de neonazioj en Okc. Germ. kaj neofaŝistoj en Italio. Precize samajn akuzojn ni legis en aliaj ĵurnaloj en Okc. Eŭropo.

Ni estus tre dankemaj, se ni ricevus respondojn post ripetita demando, ĉar viajn sloganojn ni jam multfoje legis kaj ili ne impresas nin, ĉar ni konas ilin de viaj ruslingvaj ĵurnaloj kaj de s.m. faŝistaj gazetoj.

Malgraŭ la terura akuzo ni restos viaj amikoj, ĉar ne vi kulpas pro ne sufiĉa informado.

H.M.

Donacoj

D-ro A. Vedrine, Lyon, Francujo	100 l.
s-ano N. Drezner	500 l.
S-ino J. Freudenthal (pere de d-ro Maŝler)	40 l.

ELI dankas pro la subteno de nia movado.

o o o o

Israelaj Esperantistoj

D-ro H. Mašler - Meritoj de Samideano - J. Ŝ.

Laŭ la decido de la estraro de E.L.I. oni aljuĝis al s-ano d-ro H. Mašler arĝentan pokalon, kiel aprezon pro lia konstanta valora agado por la esperanto-movado en Israelo.

La pokalo estis enmanigita al d-ro Mašler dum la Landa Konferenco okazinta en Marto 1975.

D-ro M. memlernis Esp. en la jaro 1961 el la pollinva lernolibro de L. Turno. Estinte ankoraŭ novulo li venis al la konkludo, ke la plej bona vojo por ekregi Esp. estas samtempa instruado. Li tuj komencis instrui la lingvon.

Liaj unuaj kursoj estis gvidataj en gimnazio kaj popollernejo. Poste li sukcesis ricevi lokon en la urba Junularcentro en Tel Avivo. Ĉiujare li gvidas du kursojn; ili ĉiuj sukcesis. Tra tiuj kursoj pasis jam pli ol 1000 lernantoj.

D-ro M. tradukis la lernolibron de Turno al la hebrea. Li presigis ĝin per sia propra mono. (Ĉar tiam la kaso de ELI estas preskaŭ ĉiam malplena.) Forvendado de la libro donis altan profiton per kiu li ricevis siajn elspezojn. Li rezignis poste de siaj aŭtorrajtoj kaj enspezoj de lernolibro enfluis en la kason de E.L.I., simile kiel la enspezoj de la ĉiam profitdonaj kursoj en la Junularcentro. Li donacis dum pli ol 10 jaroj ĉiujn honorariojn, kiujn li ricevis kiel kuracisto. Dum multaj jaroj tiuj enspezoj kovris 80% de ĉiuj bezonoj de E.L.I.

De la lernolibro-la unua en la moderna hebrea lingvo - s- t- ĝis nun forvenditaj 2200 ekz.

D-ro M. sole helpis eldoni 2 librojn de A. Holzhaus: Trompeter kaj H. Heine.

Li preparis multajn informilojn pri esperanto en hebrea lingvo (helpe de A. Manor) kaj esperantlingvajn pri Israelo. En Israela gazetaro aperis 20-30 liaj informoj pri Esp. La plej gravaj de ili estas en hebrea instruista gazeto "Hed Haĥinuĥ" kaj en la gazeto de akademianoj (hebrea traduko de A. Manor.). D-ro M. estis intervjuita 8 foje en radio, la plej grava de tiuj intervjuoj estis duonhora intervjuo de la priscienca radioprogramo "Olam Hamada" (Mondo de la scienco).

Preskaŭ ne estas kampo de informado ne plugita de d-ro M.: Dekoj da prelegoj en lernejoj, institucioj kaj diversaj organizaĵoj. Li organizis sole en Junulara Centro ekspozicion s.t. "Turismo per Esp." Antaŭ UK, kiujn li partopren-

is, li pretigis esp. salutvortojn de diplomatoj israelaj kaj instruis ilin senriproĉe tralegi. Li ankaŭ gvidas la oficialan korespondadon kun eksterlandaj institucioj por ELI kaj I.E. Li gvidas en la klubejo senĉesan kurson por progresantoj kaj faras plej laborokupan laborparton de la administra laboro de I.E. Li estis jam de la komenco PD por medicino kaj turismo. Li gastigas niajn eksterlandajn gastojn kaj ofte montras al ili Tel Avivon kaj ĉirkaŭaĵon per sia aŭtomobilo.

Certe tiel ampleksan aktivecon de unu sola persono oni ne povas tutkovri en unu artikolo. La progreso de esp. movado en Israelo estas ne imagebla sen lia senĉesa agado.

Lasttempe ni eksciis, ke ankaŭ pro sia faka laboro li estis premiita de Malsanul-Kaso kiel la sola kuracisto en Tel Avivo kaj kiel unu el kvar en Israelo (inter kvar mil kuracistoj). Ĝi signifas, ke la laboro por esp. ne malhelpas ankaŭ al li distingigi en sia profesia laboro.

D-ro M. donacis de sia premio 200 l. por ELI.

Ni recenzas

"Enciklopedia Vortaro Esperanto-Jida" de H. Rusak (du volumoj), Jerusalemo 1969-1973.

Antaŭ mi kuŝas duvoluma verko: "Esperanto - Jida Enciklopedia Vortaro" H. Rusak.

Ĝi estas kompilaĵo interpretanta la sencon de ĉiuj esperantaj radikoj kun iliaj derivaĵoj pere de jida lingvo. Krom la ĝustajn tradukojn ĝi enhavas klarigajn notojn, kiuj donas ne nur unusolan identan vortinterpreteton, sed proponas plej diversajn paralelajn semantikaĵojn kaj diverseblajn sinonimajn leksemojn en la Jida, por ke la vorto aŭ gloso estu ĝuste komprenota laŭ la signifo kaj laŭ la uzpovo. La vortaro klare prezentas al la bezonanto la morfologion de radikaj afiksitaĵoj kaj kunmetitaj vortoj. Unuvorte- enciklopedisimila leksikono por esp.-jidlingvano

La aŭtoro dediĉis por tiu ĉi giganta laboro multajn jarojn, eluzante multajn diverslingvajn vortarojn, leksikonon kaj enciklopediojn, preparante metotan sliparon (ĝi enhavis 120.000 da slipoj).

La konstante progresanta scienco postulis enkondukon de novaj fakterminoj. Por ili li ofte konsultadis specialistojn pri botaniko, medicino, fiziko k.a. sciencoj.

La grafikaj malfacilaĵoj devigis la aŭtoron uzi teknikon de fotofseta presado.

Ni povas ĝin varme rekomendi al ĉiuj, kiuj bezonas similan lingvan helpilon.

Ĝi estas perpoŝte ricevebla ĉe la aŭtoro:
Jabotinski str. 4, Kiriat Mockin,

J. Kohen-Cedek

Ni kondolencas:

Oskar (Ozer) Berman
Stella Russak
Henrik Kervin

Ozer (Oskar) Berman forlasis nin

Oskar Berman naskiĝis en Łódź (Polio) en la jaro 1882 kaj atingis tre altan ekonomian postenon kiel direktoro de la plej granda fabriko de teksa industrio en Polio- "Widzewska Manufaktura".

Lia libera tempo estis dediĉita al la esperanto movado, al "La Juda Landkona Asocio" kaj al ĵurnalismo. Li skribis pri Esperanto, turismo kaj ĉio kio koncernis la homan justecon kaj amon.

Mi renkontis lin unue dum la Tutpola Esperanta Kongreso en la jaro 1933 en Lublin. Li havis poŝojn plenajn da sukeraĵoj, kiujn li distribuis al ĉiu renkontita homo. Kaj tiel li fiksiĝis en mia memoro: La bonkora, grandanima homo, kiu ne havas proprajn infanojn, sed la tuta homaro estas lia infanaro. Kiam Imre Ungar, la blinda hungara Judo ricevis la unuan premion en pianista ŝopena internacia konkurso en Varsovio, Oskar gastigis lin tre gastame.

Li translokiĝis al Israelo en 1935 kaj laboris en Ministerio de Edukado. Ankaŭ ĉi tie li estis la grandanima onklo de la movado kaj honora membro de Eli. Dum la lastaj jaroj li loĝis en Hadero.

Sur la tombon de la entombiga ceremonio s-ino Ŝor metis la florkronon je la nomo de la Movado.

La bonkora, grandanima onklo de la movado forlasis siajn "infanojn", sed lia rideto brilas inter ni kaj radias amon al ĉiuj.

Aŝer Ron

Je la memoro de D-ino Stela Rusak

La 28-an de Marto ĉ.j. forpasis en Hajfo multmerita esperantistino: s-ino Stela Rusak, la fidela edzino de nia samideano Hanoŝ Rusak kaj sindonema patrino de ilia filo David, kiu ankaŭ lernis esperanton.

Ŝi apartenis al la tipo de "judkarakterata patrino", patrinceca ne nur rilate al la filo, sed ankaŭ rilate al la edzo kaj al ĉiu, al kiu oni povas etendi helpmanon. Ŝia gastameco estis vere modela, precipe rilate al la samideano.

Ŝi postlasis priprolantan familianaron kaj kune funebrantan esperantistan familian rondon.

La memoro pri ŝi restos en koroj de ĉiuj, kiuj ŝin konis.

J.K.C.

Kun granda malĝojo E.L.I. sciigas, ke forpasis nia granda amiko s-ano Henri K e v e r s el Nederlando.

Li estis la unua kiu sendis al israelaj samideanoj vortojn de simpatio dum niaj malgajaj tagoj dum la lasta milito. Tiuj vortoj helpis al ni en nia psika stato, ĉar ni eksentis, ke ni ne estas solaj en la mondo, ke estas homoj kiuj simile sentas kiel ni.

Niaj kondolencoj al lia edzino Els. (ankaŭ samideano.)

H. M.

Angulo de J.E.L.I.

La pikniko de J.E.L.I. en Hajfo

Sabate, la 17-an de Majo, okazis la 3-a Landa Pikniko de JELI (Junulara Esperanto-Ligo Israela).

Post la vizito en la Bahaa Templo la partoprenantoj veturis al la "Parko Karmel". Tie, ĉe la memortabulo de David Izan, ili pasigis kelkajn horojn.

Surloke, kun la membroj de familio Izan kaj aliaj neesperantistoj, oni fiksas ŝildon kun esperantlingva teksto: "Belvidejo je la memoro de leŭtenanto David Izan (1949-1970) pereinte defendante Israelon."

La prezidanto de JELI, Moŝe Ben-Porat, rakontis pri la vivo kaj morto de sia kamarado David.

S-ro Daniel Izan, la patro de David, simpatias esp. kaj estas en bonaj kontaktoj kun JELI-anoj. Inter alie -JELI partoprenas jam de 4 jaroj la junularajn tutlandajn simpoziojn okazantajn printempe en la universitato de Hajfo je la iniciato de s-ro Izan.

JELI-anoj daŭre renkontiĝas ĉiumonate. La lastaj renkontiĝoj havis lokon en Tel Avivo, Natanja kaj Kirjat Tivon.

JELI jam havas 3 konstantajn reprezentantojn ĉe la Centra Komitato de E.L.I. Ili tre faciligas la laboron de plenkreskuloj, kiuj pro la aĝo devas malgrandigi sian fortstreĉon. A. Kuperman fariĝis peranto de UEA.

La UK kongreson en Kopenhago vizitis ĉi jare du JELI-anoj: A. Wandel kaj A. Kuperman. A. Wandel vizitis ankaŭ la kongreson de TEJO en Fredericia (Danlando).

Nia movado kaj agado

Letero al U. E. A.

ELI-post la kunsido la 2-an de Septembro-decidis sendi al UEA la jenan leteron:

Tre estimata Direktoro d-ro V. Sadler, UEA.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis Vian respondon je nia letero pri propono ŝanĝi statuton de UEA rilate neŭtralecon. Vi skribis, ke la letero estis forsendita al s-ro Moritz por respondo. Ni substrekas, ke la letero estis de la landa asocio, ne mia privata. Simile, tiu letero kiun mi skribas ne estas mia privata sed letero de ELI post la kunsido de estraro, la 2-an de Septembro. Ĝis nun ni ne ricevis respondon de s-ro Moritz. (De la unua letero pasis jam ĉirkaŭ 8 monatoj).

Ĝis nun ni pensis, ke ĝi estas eble neglekto, aŭ eble manko da tempo. Atingis nin tamen la numero 835-6 de "Esperanto", kiu pruvis, ke ĝi ne estas hazardo.

En la lasta tempo arabaj ŝtatoj, per abunda mono de plialtigitaj prezoj por nafto, instigas multajn organizaĵojn ekzigi Israelon de internaciaj institucioj. Ili sukcesis ekzigi Israelon el la sportaj turniroj en Azio kaj el UNESKO. Nun evidentiĝis, ke ilia influo ne preterlasis ankaŭ UEA.

En longega kaj detala artikolo pri "Azio al azianoj" ne troviĝas Israelo. Mi ne pensas, ke ne estas konate al la aŭtoro kaj al la redaktoro de "Esperanto", ke laŭ la proporcio al la nombro de loĝantaro Israelo (3.000.000) havas la plej grandan nombron en tuta Azio de D. kaj FD. Ĝi havas ĉiamajn kursojn, klubojn ĉiusemajne funkciantan, ĝi kunlaboras kun ĉiuj entreprenoj de UEA, akceptas gastojn de la tuta mondo, eldonas bultenon, eldonis lernolibrojn kaj vortaron.

La "neŭtralan" sintenon mi trovis en la sama artikolo, kie inter aliaj estas laŭdegata "El Popola Ĉinio" pro ĝia enhavo. S.n. ĵurnalo estas konata pro sia ekstreme politika enhavo. En la sama numero troviĝas vortoj pri Suda Koreo: "Dum ne klariĝos la situacio en ilia lando". Kiun klarigon bezonas UEA? Ĉu eble okupadon de la Norda armeo?

Nun ni petas ne respondon skriban. La artikolo estis en "Esperanto", la respondo devas aperi en "Esperanto." Mi volas nur aldoni, ke laŭ nia opinio simila sinteno de UEA ne helpas al nia movado. Eble UEA ne estas interesita pri la movado en Israelo?... Tion ĝi povas facile atingi. Estas pli facile detruigi movadon ol kreskigi ĝin. Ĉu por tio estas bezona tiu "aktiva neŭtraleco"?

Subskribis d-ro Maŝler
(je la nomo de ELI).

Ĉi tiu numero de I.E. aperas kun malfruigo de unu monato pro la somera libertempo de la redakcio.

Prelegoj en la klubejo:

- J. Giladi - Miaj korespondantoj
- A. Ron - Ensbado de sovetaĵ intelektuloj en Israelo
- R. Alberg - Socia vivo en USONO
- K. Perlman - Sara Bernhardt
- N. Drezner - Kamarada interparolo
- H. Maŝler - Memorprelego pri d-ro Zamenhof
- K. Perlman - Vivo kaj verko de Mozart
- J. Giladi - Esperantaj proverboj
- K. Knoop - Lumbildoj de Nederlando
- D. Ŝor - La ideo de racia egoismo
- H. Maŝler - La granda neglekto antaŭ 30 jaroj
- N. Drezner - Koversacia vespero
- I. Dektor - Kvindek jaroj en esp. movado
- R. Alberg - La vivo de Judoj en USONO
- A. Manor - La juda kontribuo al la monda kulturo
- K. Perlman - Virinoj en la historio
- D. Ŝor - La internacia jaro de la virino
- J. Balbin - Esperantaj poemoj

M. Bukovcser-La israela movado por liberigo de la virino
A. Manor -Esperanta gazetaro

Pro la fermo de "kultura Centro por plenkreskuloj, nia klubejo estos fermita ĝis la 2-a de Oktobro.

o o o o

La Venontaj prelegoj

2.Okt.	Giladi,	Raporto de UK en Kopenhago
9.Okt.	Kupermann	Finlando (unua parto)
16.Okt.	Alberg	(La temo estos sciigota)
23.Okt.	Kupermann	Finlando (dua parto)
30. Okt.	Manor	Trarigardo de esp. gazetaro
6.Nov.	Drezner	Konversacia vespero
13.Nov.	Giladi	Esperantaj proverboj
20.Nov.	Wandel	Junulara kongreso en Danlando
27. Nov.	Ron	(La temo sciigota)

Povas okazi ŝanĝoj pro diversaj okazaĵoj.

o o o o

Letero

Al la Estraro de E.L.I.

Karaj!

Kvankam mi ankoraŭ ne ekvekiĝis de la granda perdo pro la foriro por eterne de mia ne forgesbla edzino-vivkamaradino, ĉies amikino, Frida ^ŝ, tamen en mia memoro restos por ĉiam la lasta honorigo, kiun Vi donis al Frida ^ŝ dum la entombigo kaj dum la memorŝton'-malkovro. Pro la S-ana ago de ĉiuj, mi decidis kiel respekt-esprimo donaci al E.L.I. kvincent (500) lir'.

Kun respekto

Tel Aviv, 1.7.75

Naŭm Drezner

Sciigoj kaj informoj

Israelanoj en la 60-a UK.

Naŭ israelanoj partoprenis ĉi jare UK en Kopenhago. Ĝi estas la plej granda nombro de partoprenantoj UK post la jaro 1947.

Jen la nomoj: Giladi, Heimliŝ. Isakov, Kuperman, Wandel, Levin, Roth, Uko, Zimand.

o o o o

Nova peranto de UEA: Funkcion de peranto por UEA havas nun s-ano A. Kuperman. Lia adreso: Adrian Kupermann
Tel Avivo p.k. 3459.

o o o o

S-ano Israel Israeli ĉesis sian funkcion kiel peranto por UEA pro sia malsano. Li estas nun en malsanulejo Tel Hašomer. ELI deziras al li rapidan kaj plenan resaniĝon kaj dankas al li pro lia sindonema ne facila laboro.

o o o o

Novaj gesamideanoj

La 16-an de Julio okazis la finekzameno de la 22-a kurso de Esp. (gvid. d-ro Maŝler). Ricevis post la ekzameno atestojn: Fani Spongina, Barak Cipor, Ajelet Cipor, Eti Kremer, Avi Miller, Ejal Sarusi, d-rino Stela Wiślicka kaj Rina Gavrieli. Ekzamena komisiono: H. Maŝler kaj J. Semer.

En Aŭgusto ekzameniĝis Jehudit Wandel kaj ŝia 12-jara filino Dorit. Instruis siajn familianojn Amri Wandel.

Estu bonvenaj en nia movado!

o o o o

Bona ideo

Nia gasto el Svislando, s-ano E. Gehring, kiu vizitis nian klubejon en Majo 1975 kun sia edzino, donacis al ELI sigelilon, per kiu li scipovis propagandi efike kaj malmultekoste nian lingvon.

La sigelilo troviĝas ĉe la estraro kaj ĉiu samideano povas stampi stokon de siaj kovertoj per ĝi en la klubejo dum niaj kunvenoj; aŭ, se li sendos pakajon da kovertoj, li rericevos ilin perpoŝte stampitajn. (Aldonu poŝtmarkon por la poŝtelspezoj).

Eksterlandaj gastoj

Dum la lastaj monatoj vizitis nian klubejon multaj eksterlandaj gastoj. Kun ĝojo ni denove vidis inter ni s-inon Dittlof Tjassens Lips. Ŝi vizitis ankaŭ nian Landan Konferencon. Ceestis ĝin ankaŭ la prezidanto de la Svisa Esperanto Societo s-ano O. Walder. S-anino K. Knoop montris siajn belajn lumbildojn de Nederlando. S-ano Gehring el Luzerno feris kelkajn semajnojn en Israelo kaj donacis sian propagandilon. (legu supre!). Tre altnivelajn vesperojn donis al ni prof. de lingvistiko el Nov Jorko, poeto d-ro J. Balbin. Vizitis nin ankaŭ pupteatra aktorino de Rumanio J. Sigmond, s-ano A. Mazuhr -Germanio, Kalomojzer-Estonio, Káthn Ginter-Germanio, S-anino Gatri -Hungario, Ges-anoj Einiŝoviĉi -Australio. Anoncis sian viziton Ges-anoj Anjer -Norvegio.

 I-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto Movado

Inter la 10-a kaj 16-a de Aŭgusto 1975 okazis en la Filozofia Fakultato de Saarlando la I-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto Movado. Pri la programo prelegis: Lapenna, Reinhard, Hauptenthal, Dratwer, Vermaas k.a. Ili priparolis la lingvan problemon en la mondo kaj aktualajn taskojn de la nova movado. La konferenco signas komencon de nova agado por Esperanto. Oni decidis aranĝi la II-an Konferencon en la jaro 1976 en Francio.

La Konferenco decidis:

1. Konservi ideologion de la neŭtrala homa kultura karaktero de la Zamenhofa Esperanto kaj humaneca internaciismo.
2. Estigi internacian agadgrupon politike neŭtralan por disvastigi la lingvon kaj la movadon.
3. Eldoni periodaĵon "Horizonto" por diskonigi tiun deklaron kaj aktivadi agadgrupojn en ĉiuj niveloj. Alvokas esperantistaron orientiĝi pri veraj kaŭzoj de la nuna politiko de UEA.

Protestas kontraŭ malveraj asertoj en artikolo "Dangera Ludo en Saarlando".

o o o o

Saarlanda Esperanta Movado (S.E.M.) eldonis verkon de ĉ-ro I. Lapenna, Hamburgo en Retrospektivo. (pri "kontraŭneŭtraleca politika" en UEA. 100 p. prezo: 9.80 germ. mark. plus sendkostoj. Adreso: Saarlanda Esperanto - Ligo, Franz Schubert Strasse 26. D-6602 Dudweiler Okc. Germ.

o o o o

La ĵara kotizo en Saarlanda Esperanta Ligo estas 12 germ. mark.

Korajn gratulojn kaj sincerajn bondezirojn al nia agema s-ano Jehošua Tilleman kaj lia edzino Bilha okaze de ilia geedziĝo.

E.L.I. kaj J.E.L.I.

La edziĝfestoj okazis la 9-an de Oktobro en Hajfo. Partoprenis ĝin multaj samideanoj de Hajfo kaj de aliaj urboj. Ĉe granda tablo oni povis tie aŭdi nur nian internacian lingvon. Ankaŭ s-ino Bilha, kiu komencis nun lerni esperanton, povis jam iomete interkompreniĝi en nia lingvo.

Tri J.E.L.I.-aninoj - Larisa Kravicki, Rosa Relif kaj Fani Špongjin-partoprenis dum Aŭgusto junularan labortendejon en Italio.

 K o t i z o

Pagu vian kotizon (30 l. jare) per aldonita al ĉi tiu buiteneno ĉeko. Se Vi ne povas pagi la tutan sumon pagu per partpagoj. ELI ne povas daŭrigi sian elspezigan laboron pro la plialtigitaj poŝtelspezoj kaj presado, se ni ne havos vian subtenon.

Esperanto movado estas la sola kultura entreprenoj, kiu laboras, progresas sen subteno (mona) de la registaro aŭ de aliaj flankoj. Ni havas nur subtenon de la flanko de urbestro en Tel Aviv. Ĝi donas al ni senpage ĝis nun la klubejon kaj salonon por la kursoj.

E.L.I.

 Volas korespondi

Viktòria Uhr, 2800 Tababanya v. Ifjumunkàs u.18.II/1 Hungario. 23-jara ĵuralistino.

Rolf Köhler, 402 Halle (SAALE), Südstr. 47. GDR. Okc. Germanio. 18-jara-pri internacia lingvo, moderna muziko, interŝanĝo de poŝtkartoj.

Leili Linna, U.S.S.R.-Estonio, 202900 Viliandi, str. Mäe 14-2. 25-jara fraŭlino. Soforino, interesigas pri literaturo, volas interŝanĝi poŝtmarkojn.

André Vincent, 14 rue J. Hachette, 83100-Toulon, Francio. 60-jara instruisto. (per bildkartoj).

Jan Szottysek, 22 Lipca 49, 42600-Tarnowskie-Góry, Pollando. Pri Sankta Tero, ties historio kaj Kristo.

Libor Matějka, Pekarska 68, Brno 602 00, Ĉeĥoslovakio. kolektas poŝtmarkojn israelajn, esperantajn, FDC kaj Rotary Internacian.

Gregori Sanetra, Polo, 15-jara interŝanĝas poŝtmarkojn neuzitajn seriojn, bildkartojn.

18.

Paul Poulsen, Benlosepellcen 19, 4100 Zivigstad, Danlando. 32 jara bibliotekisto, interesiĝas pri historio.

o o o o
Ursula Krauss, 666 Zeibrücken, Kreuzbergstr. 7. Germanio
20-jara studentino (sociala Pedagogio).

o o o o
T. James Brennan, 23 Kathrose Drive, Willowdale, Ontario
M2J 3P4, Canada. 42 jara edziĝintainstruisto. Pri lingvoj, vegetarismo, religioj.

Hebreoj-esperantistoj de la unua generacio.

A. Holzhaus

1. Aisberg, Eugene nask. 1905
Appelbaum, Jakob David (14 Nov.1877-7 Jan.1964)
Asnes, A.I.
Bejraň, David
Benšafar, Jakob A.
Blassberg, Maksimiliano (nask.28 Apr. 1875)
Blumental, Aleksandro
Blumental, Leo (8 Marto 1865-19 Okt. 1941)
Dambe, David (nask. 1895)
10. Davidoviĉ, Lev Akimoviĉ (mortis 20,12.1897)
Dreher, Leopold (nask. 24.10.1896)
Einstein, Leopold (1834-8.Sept.1890.)
Epstein, Felix (nask. 3. Sept. 1882)
Feldšar, Josef
Fels, Isidoro (nask. 1870)
Fels, Regina (nask. 1877)
Fridjev, Aaron Jakovleviĉ
Gernet, Vladimir Aleksandroviĉ (1870-7 Feb.1929)
Ginz, Otto (nask. 19 Julio 1896)
20. Goldberg, Mozes Sh.
Goldberg, Stanislav
Grohn, Jacob
Grünfeld, A.M. (mortis 1920)
Guminski, J.
Gureviĉ, David Sahuoviĉ
Javal, Emile (5 Majo 1839-20.1.1907)
Kaminski, J.D.
Kofman, Abram S. (1865-1940)
Kohen Cedek, Josef (nask.1904)
30. Kornfeld, Salomono (nask. 1.Jul. 1896)
Kotzin, Boris Josifoviĉ (1887-5 Aug. 1958)
Krenicki, Izaak (nask.26 Jan.1874)
Kuŝnir, Naŝum Josifoviĉ

Laňovicki, Pinñas (nask. 8 Sept. 1892)
Lejzeroviĉ, Izrael (nask. 4 Jun. 1901)
Lewin, Maurice (24 Jul.1884-12 Mar. 1971)
Lojko, Ivan Markoviĉ (mortis 25.6 -6. Jul. 1905)
Lojko, Vsevolod Ivanoviĉ
Meier, Ludvig Emil (mortis 2 Jan.1919)
40. Mirski, Boris (mortis 1920)
Moch, Gaston (6 Mar. 1859-1943)
Moscheles, Felix Stone (8 Feb.1833-22.12.1917)
Nauman, Aleksander Gotfridoviĉ
Neumanoviĉ, H.
Neumark, Ef.
Olsvanger, Emanuel (13.Apr.1888-7Feb. 1961)
Ostrovskij, Ilja Davidoviĉ(1855-1922)
Pfeffer, Emil (16 Dec. 1891-20.Nov. 1965)
Pikover, W.L.
50. Robin, Wilhelm (1873-1942)
Silbernik, Aleksandro (mortis 25 Mar. 1906)
Silbernik, Joseph (mortis 30.8.1925)
Silbernik, S.
Simon, Otto (mortis 12 Apr. 1941)
Spektor, Boruch M.
Steinhaus, Julian (1843-1898)
Šapiro, Jakob (nask. 26 Okt. 1897)
Šatunovskij, Samuel Osipoviĉ(1859-1929)
Teichfeld, Ignaco (nask. 1874)
60. Waldenberg, Aleksandro
Wiesenfeld, Edvardo (nask. 27.3.1892)
Zamenhof, Adamo (11 Junio 1888-29.1.1940)
Zamenhof, Aleksandro (1877-27 Jul. 1916)
Zamenhof, Felikso (6 Nov. 1868-4.12.1933)
Zamenhof, Klara (6 Okt. 1863-6 Dec. 1924)
Zamenhof, Lazaro (15.12.1859-14 Apr. 1917)
Zamenhof, Leono (31.10.1875-7 Febr. 1934)
Zamenhof, Lidija (29.Jan.1904-1942)
Zamenhof, Marko Fabianoviĉ (8.2.1837-30.11.1907)
70. Zamenhof, Sofio (13.12.1889-1941)
Zamenhof, Wanda (19.7.1893-30.7.1954)
Zilbernik, M. Aleksandroviĉ
73. Zweig, Stefano (28 Nov. 1881-1941)

E N H A V O

Dank` al Esperanto	N. Jalin-Mor	1.
Hejmon tr. Kohen-Cedek	D. Šimoni	3.
Jerusalemo- Ĉefurbo de Israelo	J. Šemer	4.
Publika letero al CK de BEA	H. M.	6.
Donacoj		7.
D-ro H. Mašler-Meritoj de Samideano	J. Š.	8.
<u>Ni recenzas</u>		
Enciklopedia Vortaro Esp.- Jida	J. Kohen-Cedek	9.
<u>Ni kondolencas</u>		10.
Oskar (Ozer) Berman		
Stella Russak		
Henrik Kervin		
Angulo de J.E.L.I.		11.
<u>Nia movado kaj agado</u>		
Letero al U. E. A.	H. Mašler	12.
Prelegoj en la klubejo	H. E.	13.
Letero al la Estr. de E. L. I.	N. Drezner	14.
Sciigoj kaj informoj		15.
I-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto Movado		16.
Volas korespondi		17.
Hebreoj-esperantistoj de la unua generacio	A. Holzhaus	18.

o o o o

Redakta komisiono:

Reuven Alberg
 Josef Šemer
 Dorka Wunderbaum
 Dvora Šor
Redaktoro
 Aleksander Manor